# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1976 1(53)

## II-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

# BILANCO kaj PERSPEKTIVOJ

La aktivecon de sep jaroj, kiuj pasis de post la konstitua kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en 1969, resumis en la tagoj 7a kaj 8a de februaro la II-a kongreso de ĈEA en Praha kun preskaŭ cent delegitoj el 56 lokaj grupoj kaj cent gastoj.

La kongreson salutis la reprezentantoj de la Esperanto-asocioj el la socialismaj landoj : K.Valev, sekretario de Bulgara Esperantista Asocio, P.Graetz, prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto ĉe Kulturligo en GDR, V. Khek por Hungara Esperanto-Asocio kaj B.Staszczak, ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio. Por AE SSR parolis ties vicprezidanto E.V.Tvarožek. La ĉeestantojn alparolis krome d-ro Jaroslav Kvaček, prezidanto de la Urba Packonsilio en Praha. Ĉeestis ankaŭ L.Vaňková, reprezentantino de la ĉeĥa ministerio de kulturo.

La ĉefajn raportojn prezentis la asocia prezidanto J.Vítek kaj la sekretario Z.Křimský. Por la revizia komisiono raportis ark.J.Drlík.

Oni voĉdonis pri la membroj de la nova centra komitato de ĈEA kaj de la kontrola kaj revizia komisiono. Ĉiuj proponitoj estis elektitaj. La nova CK ĈEA en sia aparta kunsido unuanime reelektis J.Vítek kiel prezidanton de ĈEA kaj elektis D.Kočvara kaj F.Patera kiel vicprezidantojn kaj Z.Křimský kiel sekretarion.

La traktadon de la unua tago gvidis J.Mařík.



Dimanĉe estis prezentitaj al la ĉeestantoj la novelektitaj estraranoj, komitatanoj, sekci- kaj komisionestroj de la asocio. Oni aprobis la novan Statuton de ĈEA kaj la regularon pri la membrokotizoj. En la sabata kaj dimanĉa diskutado partoprenis J.Vítek /pri la internacia lingvo-problemo/, P.Sittauer /SET Lanĉov/, L.Křivánek, V. Jandík /partopreno en la UK ks./, L.Rýznar /UEA kaj la membrobazo/, dr.R. Horský /Mankoj en la porpaca laboro/, J.Žák /propaganda agado/, V. Vítek /porjunulara komisiono/, Z.Hršel /kunlaboro de lokaj grupoj/, dr.V.Novobilský /la Esp.literaturo/, inĝ.J.Fritsch /teknika sekcio, vortaroj/, M.Hillebrand /la novaj membrokotizoj/, L.Kynčl /EK Praha/, O.Knīchal /Helsinki kaj niaj ĉiutagaj taskoj/.

La sekretario Z.Křimský voĉdonigis la Program-deklaron de ĈEA, la leterojn al CK KPĈ kaj UEA kaj la rezolucion pri Angolo adresitan al Ĉeĥa Packonsilio. La kongreson solene fermis la prezidanto J.Vítek.

GVIDORGANOJ DE ĈEA

elektitaj de la II-a kongreso

| | |
|---|---|
| Estraranoj : | Josef Vítek /prezidanto/, Drahomír Kočvara, Fr. Patera /vicprezidantoj/, Zdenko Křimský /sekretario/, dr.Jaromír Jermář CSc, Linhart Rýznar, Marie Turková |
| Komitatanoj : | inĝ.Vladimír Hebda, Zdeněk Hršel, prom. hist. Oldřich Knīchal, Libor Křivánek, inĝ.Vlastimil Kočvara, František Pisk, František Markl, Pavel Sittauer, inĝ.Margita Strnadová, inĝ.František Sviták, Naděžda Zedníčková |
| Vickomitatanoj : | Josef V.Otta, Věra Podhradská, Jarmila Rybáčková, Václav Vítek |
| Kontrola komisiono : | Václav Špůr /prezidanto/, ark.Josef Drlík, Milada Josková |
| Anstataŭantoj : | Gustav Heczko, Josef Vondroušek |

SEKCIOJ KAJ KOMISIONOJ DE Ĉ E A

| | | |
|---|---|---|
| Porpaca /MEM/ | prez. | O.Knīchal, prom.hist., ĈEA, Jilská 10, Praha 1 |
| Pedagogia | | V.Brožík, Komenského 949, Brandýs n.Labem |
| Fervojista | | E.Jindřich, Husova 462, Česká Třebová-Parník |
| Teknikista | | dr.ing.L.Fritsch, Mat.školské 11, Č.Budějovice |
| Medicinista | | dr.J.Hradil, Mnichovo Hradiště 325 |
| Nevidantoj | | J.Vychodil, Žandovská 304, Praha 9-Střížkov |

| | |
|---|---|
| Komisiono prijunulara | J.Vítek j., Přemyšlenská 13, Praha 8 |
| Politika kaj eduka | F.Pisk, Osvobození 19, Třebíč |
| Metodika, propaganda | Z.Hršel, Botanická 28, Brno |
| Historio, teorio de IL | dr.J.Jermář CSc, Jabloňová 43, 106 00 Pha 10 |
| Lingva | Z.Matyková, Gebauerova 1065, Hradec Králové |
| Ekzamena | inĝ.V.Kočvara, Na dolním poli 10, Opava |
| Turisma | L.Křivánek, Zborovská 1332, Písek |

SEMINARIO EN TRENĈÍN. La internacia seminario "Esperanto kaj populara muziko" okazos inter la 23a kaj 26a de aprilo en Trenčín, Slovakio. La laborlingvo de la seminario estos Esperanto. Aliĝilojn kaj la programon petu de : ZK Merina, 911 01 Trenčín, Ĉeĥoslovakio.



# * El la raporto de J. Vítek *

La ĈEA-prezidanto J.Vítek detale skizis la evoluon en la ĉs.esp.movado post 1952, kiam EA ĈSR likvidiĝis kaj la poresperanta laboro rekomenciĝis sub la ŝildo de klerigaj kaj kulturaj entreprenoj kaj uzinaj kluboj. Li rememoris la agadon de Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista /TKKE/ kaj ĝian transformiĝon je Ĉs.Esperanto-Komitato /ĈSEK/ en 1958. La sukcesa aktiveco de ĈSEK gvidis al kreo de la nova bazo por la asocia organizaĵo, kio okazis en Brno, marton 1969, kiam konstituiĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj samjare analoga asocio en Slovakio.

La politikaj eventoj en 1968-1969 trafis la movadon nerekte kaj nur marĝene. La konstitua kongreso procedis laŭ labora maniero kaj provokoj aŭ provoj inciti ilin. Per sia program-deklaro la asocio aliĝis unuanime al la ideoj de la socialismo kaj al la principoj de KPĈ.

Konsiderinda malhelpo estis komencaj malfacilaĵoj materiaj kaj tiuj kun la propra asocia ejo. Ĉio ĉi estis serioze solvita ĉefe dank'al la nova sekretario ekde 1973. En la lastaj jaroj okazis seminarioj por aktivuloj, la rondetojn oni transirigis al la kategorio de lokaj grupoj, oni plistabiligis la laboron de la sekcioj, komisionoj, CK ĈEA kaj de la estraro mem.

Antaŭ ni staras tuta vico de taskoj: elstarigi la laboron en la publikaj institucioj, plifirmigi la aktivecon ĉie laŭ la ekzistantaj eblecoj, t.e. en la grupoj, eldonagado, la kunlaboron kun la slovakaj esperantistoj, kun la asocioj en la socialismaj landoj kaj ekster ili, kun UEA...

La prezidanto akcentis la fruktodonan laboron de la MEM-sekcio, sed ankaŭ tiun de la komisionoj prijunulara, teknikista, fervojista kaj la signifajn kultur-aranĝojn /Opava, Vsetín, Mělník k.a./, sed li kondamnis tendencojn al sekteco. Oni strebu disvastigi la internacian lingvon, sed samtempe senkondiĉe plenumi ankaŭ la taskojn de nia socialisma socio, plimultigi ties kulturajn valorojn, gajni amikojn por nia patrio eksterlande kaj komune klopodi pri la konservo de la tutmonda paco.

# * El la raporto de Z. Křimský *

La asocia sekretario en sia unuhora raporto substrekis i.a., ke la asocio kaj same la sekretariejo tre serioze preparadis diversajn necesajn ŝanĝojn en la sistemo kaj stilo de la laboro. La celo estis pliprofundigi la signifon de la movado, proksimigi ĝin al neesperantistoj. Post la jaroj 1968-1969 estis necese certigi precipe la influon de la centraj asociaj organoj en la ĉiutaga agado de ĈEA kaj la respondecon de ĉiu esperantisto por la movado en ĈSR.

Samtempe estis necese solvi la ekonomian situacion de la asocio kaj ne laste normaligi ankaŭ la rilatojn kun la ŝtataj organoj.

Ĉiuj ĉi taskoj estis solvitaj relative bone kaj ankaŭ la IIa kongreso estas granda politika sukceso tiurilate.

Z.Křimský poste parolis pri la estonta laboro kaj pri la gvidlinio de ĈEA. Krom la konstanta influo je la anaro necesas turni la atenton al teoriaj laboroj, kiuj povas kaj devas defendi la problemon pri la neceso de la internacia lingvo kaj pozitive respondi la demandon, ke Esperanto povas plenumi tiun ĉi rolon. La esploroj tiurilataj devas doni klaran respondon, alie oni ne povas supozi, ke la politikaj kaj ŝtataj organoj serioze traktos la aferon.

Kiel sian ĉefan taskon en la venonta etapo ĈEA konsideras la popularigon de la ideo pri la konstanta paco, kunlaboro kaj interkompreniĝo inter la nacioj. Ĝi subtenos la Finan akton subskribitan en Helsinki kaj kune kun AE SSR publikigos en Esperanto la tekston de tiu ĉi dokumento.

Je la fino de sia raporto la sekretario dankis al ĉiuj, kiuj helpadis la asocion dum ties laborplena kaj komplika etapo. Li danis elkore ankaŭ la vivkunulinojn de multaj asociaj funkciuloj, ĉar sen interkompreniĝo en la familia rondo ne eblas plenumi la gravan taskon, kiu postulas multege da libera tempo.

# *USNESENÍ II. SJEZDU ČES*

Delegáti II.sjezdu ČES, v souladu s pověřením, které dostali od svých základních organizací, přijali na závěr jednání toto usnesení :

1. Schvalují zprávy předsedy, tajemníka a ústřední revizní a kontrolní komise a schvalují jejich postup v období mezi oběma sjezdy.
2. Schvalují změny ve stanovách svazu s tím, že je možno je dodatečně upřesnit podle připomínek MV ČSR.
3. Schvalují personální změny v sekretariátu svazu.
4. Schvalují program svazu na příštích pět let jako hlavní dokument svazu a ukládají ÚV ČES a předsednictvu, aby jej rozpracovaly do konkrétních úkolů praktického života a vedly všechny členy svazu k jeho naplňování.
5. Schvalují výši nových členských příspěvků s platností od roku 1977.
6. Ukládají ÚV a předsednictvu ÚV úkol prohloubit spolupráci se Závzom esperantistov SSR.
7. Ukládají předsednictvu ÚV ČES úkol prohlubovat a upevňovat demokratický centralismus na všech stupních řízení a zveřejňovat vhodné formy práce pro místní skupiny svazu.
8. Zavazují ÚV ČES a předsednictvo ÚV, aby ve spolupráci s ostatními esperantskými svazy a organizacemi v socialistických státech působily jednotně v mezinárodním esperantském hnutí a prosazovaly pokrokové myšlenky míru a spolupráce mezi národy.
9. Děkují odstoupivším členům ÚV ČES a ÚRKK za dosavadní práci ve prospěch esperantského hnutí.
10. Zavazují všechny členy ČES, funkcionáře místních skupin a ostatních svazových orgánů, aby podporovali přijaté závěry sjezdu a začlenili je do vlastních pracovních plánů.

## LA PROGRAMO DE ĈEA POR 1976 · · · 1980

La dokumento substrekas, ke la ĉefa misio de ĈEA estas organizi unuece ĉiujn aktivajn esperantistojn en ČSR surbaze de la lokaj grupoj, disvastigadi la internacian lingvon kiel rimedon de la interkomprenigo kaj paca kunekzistado, informi la eksterlandajn esperantistojn,kaj pere de ili ankaŭ la ceteran publikon, pri la ĉelado kaj atingoj de nia popolo en la socialisma konstruado, kun ties kulturaj valoroj ks.

Kiel pezocentro de la aktivado de ĉiuj ĉeĥaj esperantistoj devas esti konsiderata la laboro en la porpaca movado.

Eksterordinare grava tasko estas la agado sur la teoria kaj faka terenoj, precipe koncerne la prilaboradon de la lingvo-problemoj en la internaciaj rilatoj.

ĈEA klopodos ankaŭ venonte kunlabori kun la ceteraj sociaj organizaĵoj kaj institucioj /sindikataj, junularaj k.s./, kun AE SSR kaj kun alilandaj Esperanto-organizaĵoj.

## SALUTO EL LATVIO

Dank'al siaj multnombraj Esperanto-kontaktoj kun ĈSSR la 8-jara lernejo en Ziemeri /Latva SSR/ povis aranĝi la 25an de novembro 1975 grandan ekspozicion pri la elstara filo kaj heroo de Ĉeĥoslovakio kaj arda amiko de Sovetunio, kdo Ludvík Svoboda, okaze de lia 80-a naskiĝtago. Laŭ la peto de la lerneja ER "Fajrero" tre valorajn materialojn por la jubilea festo sendis E.Urbanová kaj J.Cichová el Praha kaj pluraj lernejoj el ČSR kaj Slovakio. Tial la rondeto povis kompili prelegon pri la vivo kaj politika agado de k-do Ludvík Svoboda kaj ilustri ĝin per fotoj kaj aliaj bildoj.

Ni elkore salutas vian redakcion kaj la legantaron de STARTO okaze de la Tago de la Esperanta libro,la 15a de decembro.

Esperanto-rondeto FAJRERO /sekvas 14 subskriboj/



# KONGRESON KORE SALUTIS



prez.de la urba packonsilio en Praha d-ro J. Kvaček



s-ino V.Khek por HEA




sekretario de BEA K. Valev



ĝen.sekr.de PEA B.Staszczak



prez.de CLE R. Graetz



vicprez.de AESSR E.V.Tvarožek

# KONGRESA KALEJDOSKOPO



La kongresejo situis en Praha 10, en la restoracio SKALKA.

Dank'al la helpo de iuj dungitoj en la restoracio oni povis perfekte prepari la kongresejon kaj ĉion necesan por glata procedo de la kongresaj traktadoj.



Ĉi tie, estimata samideano Šperling, estos la lasta kontrolo de la delegitoj.

Do ĉio jam estas tute klara, ĉu ?




La blanka kaj verda estas simboloj de la E-movado. La kongresejo estis aranĝita en tiu ĉi du koloroj.

-o-o-o-o-o-o-o-o-

La kvar "generaloj" kontrolas, ĉu ĉio estas en ordo, ĉar ĉiu aĵo devas esti en ĝusta tempo sur la ĝusta loko.



Věra Kvasničková el sekretariejo kaj edzino de s-ano Šperling kontrolas alvenantajn gastojn kaj transdonas la kongresajn materialojn.



Ĉu vi estas certa, kara Pavel, ke nia prezidanto V í t e k estos kapabla ankoraŭ subskribi tiujn ĉi salutkartojn? ......



Mi ja diris al vi, ke ni ankoraŭ ĝisatendos la d u a n kongreson de nia asocio !
Jes, mi ĉiam diras : kiu persistas unu minuton p l i longe, tiu venkas.



- Jaroslav Mařík - maldekstre, estis vera direktanto de la kongresa koncerto ..

Li gvidis la kongresan traktadon dum la unua tago..

Kelke da minutoj antaŭ la komenco li parolas kun alia "pioniro de la esp.movado", kun František Sviták.

Tio ne estas mona premio por la sekretario/ bedaŭrinde/, sed novaj telegramoj kun salutoj al kongreso..



Meze sidas kaj atente observas la prezidanton Vítek L.Vaňková, kiu partoprenis la kongreson kiel reprezentantino de ministerio de kulturo de ČSR. Maldekstre - la edzino de nia sekretario, Růžena Křimská.



## pozornost ODBORNÝM slovníkům

Závěrečný akt konference o bezpečnosti a spolupráci v Evropě věnuje značnou pozornost otázce výměny informací a spolupráci v oblasti vědy a techniky. Jak známo, ČES vydal nedávno odbornou publikaci ing.dr.V.Tůmy CSc "Pri la varmo", která je svou vysoce odbornou úrovní důkazem uplatnění esperanta v technických oborech. Naskytá se možnost spolupracovat s podnikovými pobočkami ČVTS nebo odděleními VTEI na závodech. Avšak snažit se například o získání možností publikovat v časopisech esperantské resumé odborných článků je problematické, dokud autoři článků a jejich čtenáři postrádají odborné slovníky.

Technické sekce obou našich svazů - českého i slovenského - připravují polytechnický slovník a to kompilací i tvůrčím způsobem. Jsme si vědomi, že nebude možno zajistit vyrovnané pokrytí všech oborů, uvažujeme proto nejprve o vydání dosud shromážděného materiálu pro potřebu našich spolupracovníků, abychom jednak informovali o dosud vykonané práci, jednak dali podnět k diskusi a postupnému vylepšování těchto pracovních podkladů.

Pokoušíme se již - zčásti úspěšně - o vytváření pracovních skupin odborníků (např. ve stavebnictví, zemědělství, hornictví), kteří by se podíleli na sestavení odborných terminářů. Předpokladem toho je zpracování kartotéky podle jinojazyčných slovníků a její doplnění o české výrazy. Konfrontací s pracovním materiálem polytechnického slovníku se zjistí, které výrazy je třeba ještě vytvořit v esperantu. Velkou část této práce musí vykonávat právě technici ( např. při sestavování kartotéky).

Kompilaci odborných slovníků považujeme za jeden z kroků na cestě ke skutečnému uplatnění mezinárodního jazyka ve vědě a technice. Očekáváme současně, že i ti technici a vědečtí pracovníci a další zájemci, kteří dosud nejsou členy příslušných sekcí našich svazů, se přihlásí ke spolupráci na tomto úkolu u jednatelů sekcí (J.Laube, Alej RA 811, 413 01 Roudnice n.L. a dipl. technik Ján Mužlay, ul. Červenej armády, bl.211/B - 20, 949 01 Nitra).

(jl)

## NI LEGIS

Vo Nguyen Giap: NEFORGESEBLAJ TAGOJ (IIa parto). Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1975, 263 pg.

La autoro, elstara figuro de la vjetnama naciliberiga batalo, rakontas pri la okazintaĵoj ligitaj kun la subskribo de la provizora konvencio inter la vjetnama kaj la franca registaroj en 1945 kaj la postaj provoj de la franca reakciularo restarigi sian regadon en Hindocinio.

La sama eldonejo aperigis en 1975 : D.R.VJETNAMIO (200 pg.), ampleksan ilustritan informlibron pri la vjetnama nacio, enlanda ekonomio, edukado, scienco, tekniko kaj kulturo.

## EL NIA LETERKESTO

Kun danko mi informas vin pri la bonorda ricevo de via tre interesa organo de ĈEA "Starto", kiun mi avide tralegis la tutan. Ege placis al mi la enhavo de la revueto. Junulara EK, Ustj-Kamenogorsk, USSR.

Gratulon pro la ĉiam kreskanta nivelo de Starto. Tre ĝojigis min la intervjuo kun la Nacia artisto K.Höger, precipe lia aserto, ke li restis fidela al Esperanto. Ankaŭ la rakonto de M.Švandrlík estas bela kaj kelkaj preseraroj ne malaltigas ĝian kvaliton. Tre interesa estis la artikolo de akademiano K.Píč pri la sciencteknika karaktero de E-o.

J.Patera, Most



AL LA ENKETO POR PEDAGOGOJ

## VARBI NUR SERIOZULOJN

Ni fine ĉesu "produkti" duonesperantistojn, kiuj eĉ post kelkjara praktikado de la lingvo nur pene balbutos kaj neniam lernos skribi siajn leterojn senerare. Tial, laŭ mia opinio, necesas dujara studado, ĉiujare dum ses monatoj kaj dufoje semajne. La nombro de la kursanoj maksimume dek ĝis dekdu - amaskursoj neniam estis sukcesaj... Al la opinio de J. Novotný (Ostatok je tak ako tak otázkou samoštudia): Mi tre dubas, ke multaj el niaj kursanoj kapablas memstare finstudi la lingvon.

Ne malofte instruas en niaj kursoj samideanoj, kies entuziasmo multe superas ilian lingvoscion. La ateston pri instrukapablo ricevu nur tiu, kiu sukcesis ĉe r i g o r a ekzameno tiucela.

Estu interese ekscii, kiajn imagojn pri Esperanto havas la homoj, kiuj aliĝas al niaj kursoj. Mi suspektas, ke tiuj imagoj ofte estas fantaziaj. Kulpas pri tio ofte niaj tro fervoraj "propagandistoj", kiuj emfazas ekstreman facilecon de la lingvo, parolas pri milionoj da esperantistoj, pri la neimageblaj avantaĝoj, kiujn portas la lingvoscio al ĝia uzantoj ktp. Kiomfoje ni jam spertis, ke la plej granda danĝero por nia movado estas tiuj senrespondecaj entuziasmuloj, kiuj ne klopodante dece ekposedi la lingvon, "fervore", sed en tute ne taŭga maniero trude propagandas ĝin.

La instruanto, antaŭ ol komenci la propran instruadon, devus laŭvere kaj sobre informi la kursanaron pri tio, kio Esperanto estas, kian rolon ĝi ludas nun kaj kiaj aplikebloj ekzistas ĉe ĝia uzado. Seriozajn homojn ni varbos nur per pruveblaj argumentoj.

Ĉiujare ni spertas ka la kurson finas nur tre malmultaj kursanoj, dum la pli granda parto da ili forfalas en ĝia daŭro. Ni ne forgesu, ke ĉiu forfalinto povas signifi gravan danĝeron por niaj klopodoj. Mi mem plurfoje audis: "Esperanto? Valoras nenion ! Mi ja iam ankaŭ lernis ĝin". Por neinformita neesperantisto tia aserto estas konvinka, ĉar diris ĝin homo, "kiu iam lernis Esperanton". Tial ni klopodu varbi nur seriozulojn, ĉe kiuj ni povas esperi, ke ili signifos plifortigon por la movado.

Alois Zmeškal



SVÉRÁZNÝM ZPŮSOBEM propaguje esperanto ve své provozovně ve Státních lázních Bohdaneč u Pardubic holič a pedikér Ladislav Mrázek. Kromě nástěnek visí na zdi různé časopisy a brožury v češtině a esperantu. Na popud L.Mrázka instalovali pardubičtí esperantisté na čelném místě lázeňské kolonády výstavku, která měla příznivou odezvu u mnoha návštěvníků. /Propagando de E-o en la banurbo Bohdaneč apud Pardubice/.

ŠVEJKOVA PADESÁTKA. 10.ročníku této významné turistické akce se letos zúčastní i esperantisté. Hromadný start kratší trasy /25km/je 25.4. v 10,00 na návsi v Putimi. Ved. akce je ing.J.Horký /9.května 1256, Písek/ který podá bližší informace, příp. zajistí skrovné noclehy.

# RONDETA VIVO

**FRÝDEK MÍSTEK**

M.Bartovská,sekretariino de LG,ricevis honoran rekonon pro sia longjara esperantista aktiveco ĉe la jarkunveno de Unuiginta Klubo de Laboruloj ROH Slezan, en kies kadro laboras la loka grupo. La 21an de dec. okazis tie en la kafejo Esperanto,prelego de A.Milatová kaj K.Dorotík "Pollando-naskiĝloko de Esperanto".

**JABLONEC** -" Kilometroj de paco kaj amikeco" - la tradicia pac-marŝo trans la Jizerské hory-montaron okazos jam je la 4a fojo la 24.4. sub la aŭspicio de Distrikta Packonsilio kaj kun internacia partopreno. Aliĝoj:Klub esperantistů p.p.190, 466 21 Jablonec, ĝis la fino de marto.

Okaze de la tradicia Nikolaa vespero,kiun partoprenis ankaŭ la amikoj el GDR kaj Pollando oni profitis 350 Kčs por la f o n d u m o de s o l i d a r e c o.

**KYJOV** - LG ĉe Uzina Klubo ROH konstatis en sia jarkunveno la 11.11.1975 multflankan agadon de la grupo en 1975. Ĉiaj membroj partoprenis preskaŭ en ĉiuj arangoj de ĈEA kaj kontaktiĝis kun multaj leteramikoj sur la tuta terglobo.La MEM - peranto J.Wohlgemuth en sia raporto "La paco-objekto de sopiro,klopodo kaj laboro de la nuntempa homaro" skizis la porpacan laboron ĉe ni kaj en la mondo.Oni pliviĝligos la kunlaboron kun Distrikta Packonsilio,al kiu estis sendita salutletero kun la propono pri helpo.Oni konstatis, ke plinombriĝis la MEM-anoj kaj la kursanoj. Estis elektita nova komitato kun la prezidanto A. Jandík kaj la sekretario Štěp. Vavřina.

**LIBEREC** - La klubo ligis kontrakton kun la Domo de pioniroj kaj junularo. La sekretario B.Hlávka kaj la prezidanto A.Nedomĕl prezentis tie prelegon pri E-o kaj pri sia vojaĝo tra Jugoslavio kun projekciado de lumbildoj. Por la junpioniroj oni organizis porinfanan kurson de E-o.La klubanoj estis invititaj al amikaj kunestadoj en la pionira kabano en Fojtka ĉe Liberec.

Kvar klubanoj partoprenis amikan renkontiĝon kun la esperantistoj en Meissen, GDR.Post la vizito al la porcelan-fabriko kaj al pluaj memorindaĵoj de la urbo ili pasigis agrablan vesperon en la rondo de esperantistoj (8-60jaraj) en la kabano apud Meissen.

**OSTRAVA** -Societan balon okazigis la 30an de januaro Kulturdomo de VŽKG en Vítkovice kun la loka grupo de ĈEA.

**PARDUBICE** -La partoprenintoj de la Zamenhofa vespero (11.12.75) en la Kulturdomo Dukla forsendis rezolucion al Ĉeĥa Packonsilio, en kiu oni postulas malpermeson de produktado de ĉiaspecaj amasekstermaj armiloj kaj tujan ĉesigon de ĉiuj provoj kun la nukleaj armiloj.

**PRAHA** - La jarkunveno de EKP okazinta la 6an de jan.sub la gvido de d-ro M.Nývlt la vicprezidanto,elektis novan kluban komitaton frunte kun Lad. Kynčl kiel prezidanto. La kunvenintoj aŭskultis i.a.la jarraporton de la EKP-estraro pri 1975 kaj prelegon de d-ro Rud. Horský, en kiu li motivis la necesön de la porpaca aktiviĝo. Fine estis aprobitaj delegitoj de EKP por la IIa kongreso de ĈEA,okazinta la 7.-8an de februaro 1976.

Omaĝe al la 116-datreveno de la naskiĝo de L.Zamenhof oni aranĝis la 9an de dec. kulturan vesperon. Alparolis 70 partoprenantojn d-ro M.Nývlt,la solenan paroladon liveris L.Kynčl,kiu finis ĝin per deklamo de "Lă vojo". La belan programon,kantan kaj fortepianludan, preparis la junulara kolektivo sub la gvido de M.Walterová.Ĝian parton oni dediĉis al legado de pacaj kaj novjaraj mesaĝoj de eksterlandaj korespondantoj lumigante la kandelojn - alsenditajn de ili - sur ornamita kristnaska arbo. /sv/

**PLZEŇ** - Honore al la XV- a Kongreso de KPĈ la LG laborbrigados ĉe plantado de arboj,kolektos 500 kilogramojn de uzita papero kaj cent kg de malnova feraĵo, plue kunlaboros kun la urba packonsilantaro kaj helpos dum la elektoj da reprezentaj organoj.En marto oni preparos ekspozicion de Esp. libroj. Tiuj ĉi devontiĝoj estas rezulto de la kluba jarkunveno.

**HAVLÍČKŮV BROD** - Publikan prelegon de d-ro R. Horský,vicprezidanto de la MEM-sekcio, vizitis la 16an de januaro 75 personoj. La prelego kun porpacaj temoj, akompanata per lumbildoj,vekis konsiderindan eĥon.

**KRONIKO**

Forpasis la vicprezidantino de la LG en Vyškov,s-ino Vítězslava Daňková.

En Praha mortis la 9an de febr. MUDr.V.Markovina-Dušková.

Honoron al ilia memoro !

Jaroslav Čížek el Praha atingis sian 70an jaron la 16an de februaro. Nian gratulon !

MEMORŜTONO AL ZAMENHOF. La rememoro pri la kreinto de Esperanto estas speciale viva en la koŝalina landregiono en Pollando.Ekzistas tie nome du memorŝtonoj dediĉitaj al d-ro L.Zamenhof. Antaŭ la Klubo de internacia libro kaj gazetaro troviĝas kompozicio de kelkaj ŝtonblokoj kaj sur la plej alta ŝtonego estas gravurita la surskribo :"Per Esperanto por la mondpaco - al L.Zamenhof - Koŝalinanoj, 1969" /kch/

EKSPOZICION DE POPOLKOSTUMOJ sur bildkartoj aranĝis en la kadro de la Semajno de internacia amikeco 1976 la EK ĉe "AERO G.Dimitrov"en Tabaka teknikumo, Peŝtera, Bulgario.

DOŠKOLOVÁNÍ pro mladé absolventy C a D kursu uspořádá na seminářích mladých esperantistů Komise pro činnost mládeže ČES společně se zkušební komisí svazu. Doškolování bude zakončeno zkouškou opravňující absolventy k pedagogické činnosti v esperantském hnutí. Komise projedná s mateřskými kluby možnost uhradit náklady účastníků spojené s doškolováním. Zájemci nechť se obrátí ihned písemně na ped.důvěrníka komise V.Škodu, Vaníčkova 36,61500 Brno 15.

## SCIENCA MONDO en Esperanto

SUBTENU PER TUJA ABONO !!!

La revuo "Scienca mondo",organo de la Monda Federacio de sciencistoj, aperanta en la rusa, angla, franca kaj germana lingvoj, estos presita ankaŭ en Esperanto - kvar numerojn po 32 paĝoj oni eldonos en Bulgario. La revuo publikigas sciencajn artikolojn precipe de ĝenerala karaktero, tial ĝi povas esti interesa por ĉiuj esperantistoj. Subtenu nepre tiun ĉi gravan atingon kaj am a s e abonu la revuon ĝis la fino de marto ĉe ĉiu poŝta filio !

LITOVAJ KANTOJ EN LA ĈS.RADIO ESPERANTE. La ĉs.radio /la stacio"Hvězda"/ elsendis la 8.12.75 inter la 22,05 kaj 22,20a horo kelkajn litovajn popolkantojn en E-o, kiujn surbendigis la eldonejo en Tallinn.

LA FILATELA KOLEKTO je la temo "Esperanto" de A.Jakubec el Hranice gajnis arĝentumitan medalon en la ekspozicio en Katowice,okt.1975. - Grandan arĝentan medalon gajnis en decembro 1975 la esp.filatelisto V. Hasala el Strážnice por sia kolekto "Esperanto en filatelo" prezentita en la tutmonda ekspozicio"Themabelga 75" en Bruselo.

Sekretariejo jam havas en sufiĉe granda stoko novan glumarkon en trikolora eldono kun la vortoj : ESPERANTO PAROLATA.

# SIGNALILO

La 4an kaj 5an de oktobro 75 kunvenis en Česká Třebová la anaro de Fervojista sekcio de ĈEA ĉe la jubilea konferenco, kiun partoprenis proks. 50anoj kaj kelkaj eksterlandanoj el GDR, Hungario, FRG, Svisio kaj Aŭstrio. La solenan etoson de la konferenco substrekis la ĉeesto de la prezidanto de ĈEA Josef Vítek.

En mallonga parolado la FS-prezidanto E.Jindra memorigis la dekjaran historion de FS kaj ĝian meritan fondinton, la unuan prezidanton B.Král el Prago. Pro la longjara laboro oni dankis plue al S.Helmeczyová, E.Jindra.s-roj Suchý kaj David.

Post mallonga kant-paŭzo la sekretario de FS F.Markl raportis pri la tutjara agado de la sekcia komitato. El la konferenco oni forsendis salutleterojn al la ministro de trafiko kaj al la eksprezidanto de FS B.Král.

La partoprenantoj entreprenis mallongan piediran ekskurson tra la parko "Javorka" ĝis la konata loko "Hory", kie siatempe ripozis la fama ĉeĥa verkistino B.Němcová. La ekskurso finiĝis en " Malgranda scenejo", kie s-ino Krusse el FRG prelegis interese pri sia vojaĝo tra Japanio, akompanante la prelegon per koloraj diapozitivoj. Vespere zorgis pri la amuza programo la ER Amikeco.

Dimanĉe, multaj partoprenintoj ekskursis en la urbon Litomyšl. Sub la gvido de akademiano K.Píč, lingvisto kaj poeto, oni trarigardis la historian parton de la urbo, speciale la tombejon, kie ripozas kelkaj famaj ĉeĥaj eminentuloj kaj vizitis la kastelon kun la naskiĝĉambro de la granda ĉeĥa komponisto B. Smetana

Pro la belaj travivaĵoj dum la kunveno oni danku speciale al J. Pištora, la ĉeforganizanto de la arango.

FERVOJA KORESPONDA SERVO celas havigi al siaj membroj senpage korespondantojn. Skribante al FKS indiku la nomon, aĝon, adreson, landon kiun vi volas kontakti kaj aldonu laŭeble internacian rpk. /FKS, 76, rue Bataille, 69008 Lyon, Francio/.

LA 17a EŬROPA FERIOSEMAJNO okazos inter la 12a kaj 18a sept.76 en Magliaso apud Lugano. La entuta restadkosto popersone, inkl.de aliĝkotizo, 350 sv.frankoj. Detalajn informojn petu ĉe J.Pištora, Nám. míru 1746, 560 02, Česká Třebová.

LA KOMISIONO POR EKSKURSOJ de FS preparis por tiu ĉi jaro :

junio – perŝipe al Nigra maro
E.feriado en Miedzyzdroje
julio – Renkontiĝo de naturamikoj en Hungario
aŭgusto – Tur.semajno en Alta-Tatra
sept. – Esp.feriado en Bulgario
La Ora pola aŭtuno en Miedzygórze, Pollando
dec. – Vintra E.ferio, Budapeŝto.

Informoj : L.Láni, Pod vrchem 59, 312 07, Plzeň.

KARAVANO al la IFEF-kongreso en Svedio ne realiĝos, ĉar "Rekrea" ne ricevis por ĝi valutojn.

KOMITATO PRI ORGANIZITA AŬTOSTOPO (petveturado) en Varsovio eldonis du informbroŝurojn, en kiu troviĝas al la plej oftaj demandoj de eksterlandanoj, kiel aliĝi al la aŭtostopo. La broŝurojn oni eldonis en ses lingvoj, i.a. en Esperanto. Ili estas dissendataj de la Socia Komitato de Aŭtostopo, ul.Narbutta 27A 02-536, Warszawa, Pollando.



# MENDU TUJ ĈE NI



REDAKTAS :
Oldřich Kníchal
/sur la foto/

# PANORAMO

Literatura almanako de STARTO
organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

LA UNUA NUMERO DE 1 9 7 6 ENHAVOS i.a.

fragmentojn el la SLOVAKA ANTOLOGIO /aperonta en 1977/ la prozon de K.V.Rais en la traduko de Miloš Lukáš kaj la faman verkon de K.H.Borovský "La reĝo Lávra" en la traduko de Tomáš Pumpr.

## korespondi deziras

SOVETIO- (junuloj inter 15- 24 jaroj) :SOZANKIJ J., Borislavskaja 95, kv.12, 293720 Dragobic,obl.Lvov.o SALAVEJNTI N. Lenino 171-24 Latva SSR -SOLOVEV K.A. Kasala 9,kv.27, Minsk 13.-PALIAS Ilmar,Talinn,200016 Liiva 16,Estona SSR- STRAZNISKAS L.,234365 Stakliskes, Priemu raj.-VALIUNAS J., 234593 Punia,Hlytans raj. Latva SSR-KOTLJAROV S. (Interklub) pr. Stroitelej 10,kv.9,Meĵdurečensk 14,Kamerovskaja obl.- NAZAROVA S. 453200 Sabavat 14,70-64,Baŝkirskaja obl.-SAJMUHAMELOVA R ul.Parchomenko 97,kv.46,450005 Ufa.- DELINSKAJA L., Pervomajskaja 12-16,Novomoskovsk, Dnepropetrovskaja obl.- MURASOVSKIJ J.,339010 Makevka 10, Sovetskaja 203,kv.6.-SILO Nadeĵda,ul.Lozovaja 3, Gernovka, Pavlogradskij raj., Dnepropetrovskaja obl. - BALASOV M.Studenij pr.2,kor.2, kv.69 129282 Moskva - KIREJEV S.pr.Stroitelej 15-7, 652870 Mejdurečensk, Kemerovskaja obl. - POGORELAJA S. SU-252035 Kiev-35, Urickogo d.19,kv.73 - EMELJANENKO A. 483310 Jalgar-2,Mendelejova 16 a/8 Kazaĥa SSR - SALONATOVIC Jalgas,Beregovaja 80, Kazaĥa SSR- MUHUMOVA S.Beregovaja 80, Kazaĥa SSR - MAJER A., Bajkalskaja 32-5, Kazaĥa SSR-MOVČAN Larisa, Mendělejova 5a/4, Jalgar-2,483310 - Esperanto Klubo en Soĉi, (centro), p. k. 6, 354000 - Sekr.de Kulturdomo EK Kirovskij pr. 42,Leningrad 22. - SALAVIOTE Natalia,235400 Šiavliai, Lenino 171-24,Litova SSR-.

BULGARIO - HARIZANOV Z.,str.Kiril i Metodi 26 A,50000 Veliko Tarnovo -A.KONSTANTINOVA, str. Samuil 12 A, 8200 Pomorie-A.O. KAZAKIEVA,str.Isar Sisman 26A, 8200 Pomorie - J. BOJKOVA,str. Veliko Tarnovo 17,8200 Pomorie -T.S.TODOROVA,str.V.Tarnovo 17 8200 Pomorie - G.PETROV, 4468 Momina Klisura, Perargiski.

P.G.DIMITROVA, 2128 str. Aprilovo,okr. Sofijski.

G.D.R.- D.ORGLER,Wasserturmstrasse 7, 7027 Leipzig -S. Steinfurt, 444 Wolfen,PSF 28838/C o H. OSWALD, 444 Wolfen, PSF 28838.

POLLANDO o W.ANDRYSIAK, Kruczkowskiego 5 m 14,58-309 Walbrzych.skr.poczt.303 - M.PIELAK, 08-404 Górzno Kol.- SMIGIELSKI S.,Piramowicza 36 (1.0.)47-200 Koźle.-K.CHACIEWICZ , 85 - 092 Bydgoszcz, ul.Orgińskwego 16.

HUNGARIO - W.MAROSVÁNI,2030Érd Baracka u.252/7 -Emöke SZILASSY,5000 Szolnok,Bercsényi,u.2. -A.GREIZ, 5000 Szolnok,Kossuth tér 10/b 1.em.3 -SIMON Árpád , 8200 Veszprém, Stadion ut. 22.

RUMANIO - I.DOBOŠ, B-dul 1 Mai No. 18, 4150 Odorheiu Secuiesc.

PORTUGALIO - José Pinto RIBEIRO, Rua dos Mercadores 51, Evora.

SVEDIO - L. KARLSSON, Matojärvigatan 28, S-981 00 Kiruna.

ĈSSR - Nataša Navrátilová,Dolní Maxov 206, 468 44 p.Josefův Důl, okr.Jablonec n.Niscu.Pentraĵarto, naturo, muziko.

HUNGARAN VIVON (nron 1 /1975 ) aĉetos kontraŭ 10,-Kčs+sendkostoj J. Patera,Růžová 2071,bl. 522, 434 01 Most. -Tri ekzemplerojn de la Biblio en E-o vendos M.Barcaj, 951 35 Velké Zálužie 676, okr. Nitra.

URĜE BEZONATA la Esp.traduko de V. Závada "Česká mírová" Sendu ĝin al J.Kafka 43163 Pernštejn, ČSSR

ADRESON de s-ino "Drahuš" el ĈSSR urĝe serĉas d-ro Modesto Belmonte de Abreu,Brazilo. Sciigu ĝin al la redakcio, ni sendos al vi lian leteron.

LA SEKRETARIO DE ĈEA dankas pro la multnombraj bondeziroj okaze de la nova jaro - al ĉiuj kaj eksterlandaj legantoj.



## INDEKSO 1975

STARTO - eldonas ĈEA,Jilská 10, 110 00 Praha 1
Resp.redaktoro O.Knichal,red.rondo :E.Felix,J. Mařík,F.Sviták.-Dohl.pošta Praha 07,sníž.pošt. popl.pov.RP Pha j.z. P/1-2283/1971.


| KONSIDEROJ, KOMENTOJ | n-ro | pĝ. |
|---|---|---|
| Ne nur dum la jubilea jaro /Sviták/ | 2 | 3 |
| Jazyk - společenský činitel /kni/ | 3 | 3 |
| Rozvahou a moudrostí, nikoli zbraněmi /Horský/ | 6 | 5 |
| Předsjezdové zamyšlení /Křimský/ | 6 | 8 |
| La lastaj tagoj en koncentrejo /Buben/ | 2 | 5 |
| Elpensaĵoj de Ekstra Bladet /kni/ | 2 | 6 |


| ORGANIZA VIVO | | |
|---|---|---|
| Bazo por ĝusta informado /Knichal/ | 1 | 4 |
| Interhelpovci odjeli před 50 lety /Vlasák/ | 1 | 3 |
| Virinoj en la ĉeĥa Esperanto-movado /Mařík/ | 3,4 | 4,4 |
| Mezinárodní vědecké sdružení esperantistů /jk/ | 4 | 11 |
| Otázka pro pedagogy /Rybáčková/ | 3 | 14 |
| Diplomatoj el 20 landoj ĉe la 60a UK /Křimský/ | 4 | 3 |
| Vsetín 1975 /kř/ | 5 | 2 |
| Vzorná akce herbortických | 5 | 4 |
| Svolán II. sjezd ČES | 6 | 7 |
| Sur alta profesia nivelo /intervjuo kun P.Rosa/ | 6 | 3 |
| Malnova tradicio en Příbor /k/ | 1 | 9 |
| SET Lančov 1975 /tk/ | 2 | 9 |
| Ze zasedání ÚV ČES /k/ | 3 | 2 |
| Tagoj de Ĉeĥoslovakio en Riga /Burgmeister/ | 4 | 8 |
| Zůstali jsme mu věrni /intervjuo kun K.Höger/ | 5 | 11 |
| Rondvojaĝo tra Pollando /lk/ | 5 | 12 |
| Sukcesa seminario en Mělník /kni/ | 6 | 2 |

| ESPERANTOLOGIO | | |
|---|---|---|
| Lingvo - interhoma komprenilo /fx/ | 1 | 7 |
| Geografiaj nomoj en Esperanto /Kořínek/ | 1 | 11 |
| Esperanto en demografio /Kavka/ | 2 | 8 |
| La popola karaktero de Esperanto /Píč/ | 3 | 9 |
| Pri E-o en la sindikata konferenco /kni/ | 6 | 11 |
| Universala lingvo de estonto /Isajev/ | 4 | 9 |
| La sciencteknika karaktero de Esperanto /Píč/ | 5 | 6 |

| RECENZOJ | | |
|---|---|---|
| Esperanto en perspektivo /Knichal/ | 2 | 10 |
| Pri la varmo /J.Kavka/ | 3 | 11 |
| Komenio kaj la internacia lingvo /jř/ | 3 | 12 |
| Partopreno de la germ. esperantistoj en la amikecaj rilatoj kun UdSSR /kni/ | 3 | 12 |
| El la vivo de bervala sentaŭgulo /kni/ | 3 | 12 |
| Premiitaj kaj aliaj noveloj de T. Sekelj /kni/ | 4 | 15 |

| TRADUKOJ, FELIETONOJ | | |
|---|---|---|
| Ĉu vi ŝatas Esperanton ? /Peon/ | 1 | 12 |
| En lirikoj /Neumann-Kořínek/ | 3 | 1 |
| Antaŭ tri dek jaroj /Matyková/ | 4 | 13 |
| Kiel oni povas pruntepreni alumeton /Leacock - Pastrňaková/ | 4 | 14 |
| Trovo de Valentin Krocánek /Švandrlík-Chvosta/ | 5 | 13 |

# S NOVÝMI POTAHY




## bude Vaše auto krásnější

Podle osvědčených střihů a z látek vkusných barev i vzorů zhotovíme

# AUTOPOTAHY *

na vozy značky ŠKODA 100 STANDARD, ŠKODA 100 LUX, ŠKODA 110 LUX, FIAT 850, OCTÁVIA 5dílná a 6dílná, ŠKODA 1000 MB-STANDARD, MOSKVIČ 408, ŽIGULI, WARTBURG 353 STANDARD A LUX, TRABANT 601 LIM. do r. výroby 1971 a modely 1972, 1973, TRABANT 601 COMBI do r. 1971 a model 1973. Ceny autopotahů se pohybují od 405 do 570 Kčs. Materiál vlna nebo vlna s chemlonem. Na požádání zašleme vzorkovnici

Písemné objednávky zasílejte na

**·VKUS - Jičín, zásilková služba·**

Textilní ul. č. 187 - PSČ 506 40

Sčt 17-0309/76